# ESPERANTO EN AFRIKO

Oficiala bulteno de la Afrika Komisiono de UEA

13-a jaro. n-ro 39 (2019: 2)


*Karaj legantoj,*

*Jen fine la 39-a numero de la afrika bulteno! Kvankam tiu ĉi numero alvenas kun malfruego, ĝi tamen enhavas multajn freŝdatajn novaĵojn, kies legado certe donos iom da ĝuo al vi.*
*Intertempe la afrikano Jérémie Sabiyumva eniris la estraron de UEA, elektiĝis novaj membroj de la Afrika Komisiono kun nova agadplano, restrukturiĝis la afrika laboro, dum plu okazis la pretiglaboroj por la 7-a Afrika Kongreso de Esperanto (AKE) en Burundo ĉi-jarfine. Ne nur pri tio ĉi eblas legi en la nuna numero, sed ankaŭ pri multaj aliaj interesaj temoj.*
*La prioritato de la redakcio estas efektive ĉiam satigi vin per diversaj informoj pri Esperanto en la kontinento kaj pririlataj movoj de afrikaj asocioj, kluboj kaj unuopuloj. Tion mi kun plezuro faras.*
*Bonan legadon!*

***La redakcio***

*****************

## Afrika Kongreso 2019: ĉu la rekorda E-renkontiĝo?

Jam 152 personoj enskribiĝis por partopreni en la prestiĝa trijara Esperanto-renkontiĝo en Afriko, nome la 7-a Afrika Kongreso de Esperanto (*https://www.esperanto-afriko.org/7aake.htm*), okazonta en Buĵumburo, Burundo, de la 21-a ĝis la 27-a de decembro 2019.


La aliĝantoj venas el Benino, DR Kongo, Ruando, Tanzanio, Togolando, Burundo, Sud-Afriko, Zambio, Kameruno, Kenjo, Turkujo, Madagaskaro, Malavio kaj Niĝerio. Ĉeestos la kongreson ankaŭ partoprenantoj el Eŭropo (Belgio, Italio, Svislando) kaj Ameriko (Brazilo). Tiuj ĉi lastaj jam anoncis sian vojaĝintencon lige al la kongreso, sed ankoraŭ ne aliĝis per *https://docs.google.com/forms/d/1Qh7inKrpZlNnmQcXLeUww8P14AlimQNWGlxKSyl4YwA/prefill*

El la atendataj partoprenantoj estos aro da afrikaj, eŭropaj kaj amerikaj instruistoj. Ili venos ne nur por viziti Burundon, konatiĝi kun ĝiaj urboj, vidindaĵoj kaj kuriozaĵoj, ĝui koncertojn de afrikaj esperantistoj kaj eventuale de alikontinentaj artistoj, sed ankaŭ por helpi en AMO-seminario, kleriga, ekzamena kaj aliaj edukaj programoj. La kongresanoj dediĉos ankaŭ tempon al diskutoj pri perspektivaj planoj rilate al la kontinenta movado, laŭ sentoj kaj emoj de afrikanoj.

Samkiel la antaŭaj afrikaj kongresoj de Esperanto, la sepa okazos sub la aŭspicio de UEA, laŭ la organiza kunlaborado inter la Afrika Komisiono kaj la landa asocio ANEB de Burundo. La kongreso estos rekordo laŭ la nombro de partoprenantoj, se ĉiuj aliĝintoj kaj jam sin anoncintoj alvenos ĉi-jarfine en Burundo.

La plej granda Esperanto-renkontiĝo laŭ la nombro de partoprenantoj ĝis nun okazinta en Afriko estas la 73-a IJK. Tiun ĉi partoprenis 110 homoj el 27 landoj de 4 kontinentoj.

# Nova Afrika Komisiono de UEA kun novaj membroj




Sub la superrigardo de la UEA-estrarano pri Afriko, Jérémie Sabiyumva, la ok novnomumitaj membroj de la Afrika Komisiono de UEA elektis, per sekretaj balotoj, inter si kunordiganton, vickunordiganton kaj sekretarion sabate, la 28-an de septembro 2019.

Laŭ Jérémie, alvenis ĉe li 4 validaj kandidatiĝoj, el kiuj 2 kiel kunordiganto, nome Viktor Ntonto (Kameruno) kaj François Hounsounou (Benino), 1 kiel vickunordiganto, Gilbert Niyukuri (Burundo), kaj 1 kiel sekretario, Joel Muhire Ndaziboneye (DR Kongo).

Fine de la voĉdonoj, elektiĝis la kunordiganto: François Hounsounou (6 voĉoj por, 1 kontraŭ kaj 1 sindeteno), vickunordiganto: Gilbert Niyukuri (8 por) kaj sekretario: Joel Muhire Ndaziboneye (7 por kaj 1 sindeteno).

Aliaj komisionanoj estas: Cedrick Irakoze (Kenjo), Adjévi Adjé (Togolando), Moses Gbetogo Opa (Niĝerio), Miora Raveloharison (Madagaskaro) kaj Viktor Ntonto (Kameruno).

Dum sia trijara ofic-periodo, la nova komisiono zorgos pri la regula aperigo de la informbulteno *Esperanto en Afriko* kaj pri okazigo de la trijara Afrika Kongreso de Esperanto, kies sepa rendevuo disvolviĝos inter la 21-a kaj 27-a de decembro 2019.

Specifaj membroj de la komisiono okupiĝos ankaŭ pri la taskoj: instruado, eksteraj rilatoj, rilatoj kun afrikaj asocioj kaj grupoj, landa, virina kaj junulara agadoj, informado, turismo kaj aliaj taskoj en Afriko, kiel tion montras la ĉi supra foto.

Ĉirkaŭ la Afrika Komisiono estas dekkvaro da pliaj aktivuloj, kiuj rolos kiel konsilantoj de la komisiono. Ili estas: Emile Malanda, Chamberline Nguefack Zedong, Florent Ntoto, Costantin Mashahuri, Antoine K. Kouablan, Birindwa Mushoshi, Gobi Ahonou, Gilbert Ndihokubwayo, Moresson Feidanhai, Aimé Patrick Manirakiza, Prince H. Oguinye, Thiaba Faye, Charles Hiza, John Magesa.

## Laborplano de la Afrika Komisiono de UEA 2019-2022

*Instigo al organizado kaj raportado pri ĉeestaj kaj perkorespondaj Esperanto-kursoj*

*Helpo al la fortigado de lokaj kluboj, instigo al la maturaj landoj (kie ankoraŭ ne estas LA) efektivigi aliĝon al UEA.*

*Revenigo de la Kotdivuara Esperanto-Asocio kiel Landa Asocio de UEA.*

*Malferma alvoko al landaj asocioj kaj grupoj por organizo de la 8-a AKE.*

*Instigo al afrikaj e-istoj por aliĝo kaj membriĝo en UEA.*

*Prelegoj, partopreno en konferencoj kaj kongresoj de landaj asocioj de UEA en la kontinento.*

*Havigo al petantoj de lerno- kaj instrumaterialoj.*

*Produktado de afrikaj filmoj, muzikoj kaj informiloj en afrikaj kaj Esperanta lingvoj.*

*Sendo de instruistoj al diversaj afrikaj landoj por lertigi esperantistojn dezirantajn iĝi instruistoj.*

*Pretigo, disdono de diversaj varbiloj kaj informiloj.*

*Reklamo de Esperanto en lernejoj kaj sociaj retejoj.*

*Instigo al kreo de TEJO-, ILEI-sekcioj kaj virinaj grupoj.*

*Kuraĝigo kaj subteno al virinaj kunvenoj.*

*Organizo de trejnseminarioj intence al gejunuloj.*

*Instigo al afrikanoj partopreni retkursojn kaj ekzamenojn de ILEI.*

*Prezento de Esperanto dum sociaj forumoj en Afriko.*

*Interesado de turismaj agentejoj kaj oficistoj pri Esperanto.*

*Okazigo de diversnivelaj ĉeestaj Esperanto-kursoj.*

*Alvoko al afrikaj landoj kandidatiĝi por organizi UK en Afriko horizonte de 2023.*

# AMO-61 en Buĵumburo, Burundo – temaro kaj alvoko

Post kelkaj tagoj komenciĝos la 7-a Afrika Kongreso de Esperanto en Buĵumburo, la ĉefurbo de Burundo. Ne estas surprizo, ĉar en tiu parto de Afriko esperantistoj montris grandan emon organizi internaciajn aranĝojn por diskonigi Burundon kaj ĝiajn vidindaĵojn al la mondo.

Estos okazo por eksterburundanoj konatiĝi kun la burunda tamburo, kiu nun estas inter homa heredaĵo (akceptita de UNESKO en 2014), folkloraj dancoj kaj viziti diversajn lokojn de Burundo kaj specife de ĝia suda parto. Ne maltrafu la okazon bani vin en la termika akvo, kiu havas terapian povon kontraŭ multaj malsanoj!



La hejmo de la 7-a Afrika Kongreso de Esperanto

Krom la kongresaj programeroj, okazos ankaŭ la 61-a AMO-seminario, kaj ĝin gvidos spertaj esperantistoj kaj estraranoj de UEA.

La subtemoj de la AMO-seminario estas:

- Kiel organizi internaciajn eventojn,
- Tutmondiĝo kaj bona komunikado kaj neperforta komunikado,
- Interreto kaj Esperanto en Afriko,
- Bona varbado kaj membrovarbado (UEA),
- Deĵorado de Mireille Grosjean ĉe UN kaj kun diversaj ministroj,
- Grupa laboro: *kiel verki gazetaran komunikon.*
- Strukturo de la movado (kiel funkcias UEA, ILEI, TEJO...) kaj bona organizado de kluboj kaj asocioj,
- Kontraŭ diskriminacio kaj por genra egaleco.

Ni celas la membrojn de la nova Afrika Komisiono de UEA, por ke ili plifortigu sian kapablon gvidi la movadon en la kontinento; pro tio ni ŝatus ke ĉiuj AK-anoj ĉeestu la kongreson kaj profitu la AMO-seminarion, kiu certe maturigos ilin. Ni ankoraŭ ne kolektis sufiĉajn monrimedojn por povi partoprenigi ĉiujn membrojn de la Afrika Komisiono de UEA, kiu havas gravan taskon en la afrika E-movado. Ankoraŭ mankas pli ol 3000 eŭroj.

Por doni monon al la kongreso oni bv. plenigi la formularon: *https://uea.org/alighoj/donacoj/afriko* kun indiko la « 7-a AKE ».

Ĉio alia pri la 7-a Afrika Kongreso de Esperanto ĉe: *https://www.esperanto-afriko.org/7aake.htm*

**Jérémie Sabiyumva**



## Konservi gazetajn artikolojn ĉe *archive.org*

Kelkaj gazetoj, radio-stacioj ktp. montras siajn artikolojn k.a. ne eterne – post kelka tempo ili ne plu disponeblas rete.

Feliĉe ekzistas *https://archive.org/* . Tie troviĝas multaj artikoloj el gazetoj.

Se io ne jam troviĝas tie, eĉ eblas peti, ke *archive.org* transprenu kopion :)

Ĉu vi jam uzas ĝin?

**Lu**

# Jérémie Sabiyumva: vi povas subteni la 7-an AKE

*Vi kaj burundaj kolegoj, en la kunlaboro kun la Afrika Komisiono de UEA, prepariĝas por gastigi baldaŭ la 7-an Afrikan Kongreson de Esperanto – la plej prestiĝan Esperanto-renkontiĝon en Afriko – de la 21-a ĝis la 27-a de decembro 2019 en Buĵumburo ĉe la sidejo de* SOS-enfants. *Bonvolu, kiel loka ĉeforganizanto, respondi al la sekvaj demandoj: kio instigis vin kandidatiĝi por la organizo de la plej granda E-renkontiĝo en Afriko?*

Unue, Burundo ekde multaj jaroj kandidatiĝis por organizi internaciajn aranĝojn, sed pro la politika situacio tio neniam konkretiĝis. Mi memorigas al vi la sesan Afrikan Kongreson, kiu pro la malbona politika situacio, devis fine organiziĝi en la najbara Tanzanio.

En la jaro 2017, ni kandidatiĝis por organizi la unuan Internacian Junularan Kongreson en Afriko, sed ankaŭ ne sukcesis. Niaj togolandaj amikoj tiam devis lastmomente transpreni la organizadon, kaj ili sukcese okazigis ĝin.

En Burundo, ekde 2000, eksplodis Esperanto en multaj enlandaj provincoj kaj aparte en lernejoj. Ni ekorganizis naciajn kongresojn kaj eĉ regionajn aranĝojn, multiĝis esperantistoj, kaj necesas montri al ili, ke vere Esperanto ekzistas. Pro tio ni daŭre havas emon organizi tutafrikan kongreson.

*Kiujn konkretajn agojn vi jam realigis en la pretiglaboro kaj problemoj, kiujn vi frontis kaj solvis?*

Mi diros, ke ni jam ekpripensis la kongresan organizon antaŭ ol la Afrika Komisiono aprobis nian kandidatiĝon. La loko de la kongreso estas tiu bela lernejo, kiu devis gastigi la 6-an Afrikan Kongreson kaj IJK-n. La nunaj lokaj organizantoj estas preskaŭ la samaj personoj kiel de la maltrafitaj aranĝoj. Ni jam kunsidis kaj eĉ faris multon. La lernejo, kiu utilos kiel la kongresa hejmo, jam estis rezervita, la ekskursejoj elektitaj, folkloristoj kontaktitaj, ni ankaŭ jam havas ideon pri personoj, kiuj kuiros manĝojn por la kongresanoj. Mallonge, ni jam faris la plej grandan parton de la laboro, tamen ni esperas fari ankoraŭ pli dum la venontaj tagoj kun la afrikaj komisionanoj, ĉar kompreneble la kongreson organizas ne nur burundanoj, sed ankaŭ spertaj afrikaj komisionanoj.



Jérémie Sabiyumva

*Ĉu eblas doni bazajn informojn pri la kongresejo, kaj kiel eblas atingi ĝin de la ĉefurbo Buĵumburo?*

La kongresejo staras en la urba centro, ĝi estas facile atingebla de la flughaveno aŭ de iu ajn angulo de Burundo. La kongresejo troviĝas en la distrikto Mukaza, precize en la kvartalo Nyakabiga. Do de la urba centro ekzistas busoj, kiuj regule iras tien unu post la alia. La kongresejo estas proksime de la hospitalo por militistoj. Por tiuj, kiuj venos de Ruando, Tanzanio, Ugando kaj DR Kongo, bushaltejo estas je kelkaj metroj de la kongresejo. Eblas de tie atingi eĉ piede la kongresejon.

*Certe la Afrika Komisiono de UEA kaj vi pretigas buntan kaj abundan programon por festi kune la 7-an AKE. Ĉu vi povas iomete rakonti pri eroj el la kongresa programo?*

Estos multaj interesaj programeroj, i.a futbala maĉo, kiu jam iĝis tradicio en AKE, kursoj perfektigaj, kursoj por komencantoj, trejnado pri kurso-gvidado, mastrumado de kluboj, asocioj ktp. Por tiuj, kiuj jam aŭdis pri la burunda tamburo, estos ankaŭ por ili okazo spekti ĝian ludadon propraokule. Certe vi jam aŭdis paroli pri termika akvo, tiu akvo, kiu sanigas homojn, kiuj baniĝas en ĝi. Estas unu el la celoj de la dumkongresaj ekskursoj *https://www.youtube.com/watch?v=vuOIavKDSWg&t=182s.* Vere buntaj kaj ĝuindaj programeroj atendas ĉiujn, kiuj sukcesos veni al Burundo.

*Kion vi atendas de viaj partneroj kaj potencialaj partoprenantoj por la komuna sukceso de la kongreso?*

Unue, la kongreso ne estas por burundanoj, ĝi estas por ĉiuj partoprenantoj. Mi do alvokas ĉiujn proponi kontribuojn por la programo. Ni volas aŭdi ankaŭ de aliaj pri iliaj kulturoj en la vesperaj programoj.

Alikontinentanoj bonvolu aliĝi al la kongreso: *https://docs.google.com/forms/d/1Qh7inKrpZlNnmQcXLeUww8P14AlimQNWGlxKSyl4YwA/prefill*. Estos granda honoro havi vin inter ni. Mi ankoraŭ memoras la etoson dum la 6-a AKE: estis tre interese havi, krom afrikanojn, multajn alikontinentanojn. Ili ĝuis senlime la kongresan etoson, eluzis la renkontiĝon por priparoli gravajn aferojn, kiuj koncernas la organizan vivon de nia movado. Certe ni lernos de la renkontiĝo por konstrui pli fortan movadon.

*Kiaj estas viaj deziro kaj espero, lige kun tiu ĉi gravega renkontiĝo en via lando?*

Mia espero estas, ke tiu ĉi kongreso ĉe la fino kroniĝu per sukceso, ke ĉiuj partoprenintoj povos forlasi Burundon kun bonaj memoroj kaj pri la kongreso kaj pri la lando! Ke tiuj, kiuj pro iuj aŭ aliaj kialoj ne povas ĉeesti mem la kongreson, povu tamen kontribui al ĝia sukcesa realigo per mondonaco al la konto *Afriko* de UEA kun mencio "AKE-7" kaj per sendo de salutmesaĝoj al: *afrikakongreso7@gmail.com.*

*Ĉu vi havas ion apartan por diri?*

Jes! Ni organizas la 7-an AKE por ke la homoj partoprenu ĝin. Mi scias, ke en la regiono estas multaj talentaj junuloj, do ili ekpreparigu por ne maltrafi tiun okazon, kiu eventuale revenos en la regiono nur post pluraj jaroj. Por enlandanoj, estu okazo lerni de aliaj samideanoj, kiuj venos de ekstere. Mi esperas, ke venos ne nur junuloj, ĉar ni atendas ankaŭ pliaĝajn esperantistojn. Kaj fine, mi volas diri dankon al vi pro la intervjuo.

**Intervjuis la redakcio**

**Multfaceta agado por disvastigi Esperanton en Afriko okazas per donacoj al la konto Afriko. Por sendi monsubtenon al *Afriko* oni bv. plenigi la formularon:**

***https://uea.org/alighoj/donacoj/afriko***

# Biblioteka Apogo

Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Jam la sesan sinsekvan jaron UEA disdonas subvenciojn el la Biblioteka Apogo Honore al la geedzoj Johano kaj Maria Bachrich, mallonge nomata Biblioteka Apogo Bachrich, kiu celas pliriĉigon de Esperantaj bibliotekoj, kiuj ne ricevas ŝtatajn, urbajn aŭ aliajn movadajn subvenciojn.

La fondaĵo estis starigita en 2014 de komenca kapitalo (20000 USD) donacita de la familio Bachrich memore al Johano kaj Maria, venezuelaj esperantistoj forpasintaj en 2005 kaj 2011 respektive. Per la subvencio eblas aĉeti librojn kaj aliajn varojn ĉe la Libroservo de UEA.

En 2018 estis disdonitaj entute 1619 eŭroj al 15 bibliotekoj en Eŭropo, Suda Ameriko kaj Afriko.

Por plenigi vian subvencipeton, bonvolu indiki klare la nomon, poŝtan adreson kaj detalan priskribon de la biblioteko. Akiru kopion de la tabelo "Materialoj aĉetotaj de la suvencipetanto" kaj uzu ĝin por via mendo, kiu nepre devas inkluzivi la titolon, la kvanton kaj la prezon de ĉiu individua mendotaĵo, kiel ili aperas en la reta katalogo de la Libroservo de UEA. Alkroĉu la plenigitan tabelon al via subvencipeta mesaĝo. Nur ĝuste plenigitaj enketiloj estos prijuĝitaj de la skipo disdononta la subvencion nome de UEA.

La petoj atingu la respondeculojn ĝis la 15-a de novembro 2019 retpoŝte al *bachrich@co.uea.org*, kopie al *oraola@esperanto.org*.

Okaze de duboj pri la pretigo de subvencipeto, bonvolu ne heziti kontakti la respondeculojn ĉe la supre indikitaj retadresoj.

**Gazetaraj Komunikoj de UEA**

# Konversacia rondo en DR Kongo

En la kadro de la plenumo de sia ĉi-jara agadplano, la DR Konga sekcio de ILEI organizis konversacian rondon en la romkatolika paroĥo Sankta Rita de Kinŝaso, la 5-an de oktobro 2019.

Deko da personoj el diversaj lokaj grupoj ĉeestis la renkontiĝon, nome Alexandrine Omba (sekretariino de la sekcio), Remond Mata (vicprezidanto de la sekcio), Jean Bosco Malanda (respondeculo pri financoj), Florent Ntoto (sekciestro), Lofemba (prezidanto de E-klubo en UPN), Emery, Didier Kuyindama, Christvie, Emmanuel, Joseph kaj Raïssa.



Kelkaj el la partoprenintoj de la konversacia rondo

La renkontiĝo okazis sub la temo *Kiel vigligi la Esperanto-movadon en D.R. Kongo?* Estis grava okazo por ĉiuj kunsidantoj esprimi sin en Esperanto dum sufiĉe da tempo. La etoso estis ne nur amuza, sed ankaŭ lernoplena.

El la diskutoj pridecidiĝis: a) vigligi prioritate lokajn klubojn kaj grupojn, multobligante iliajn agadojn, ĉar kluboj estas la bazo de la movado kaj vigleco de la tuta asocio dependas de tiu de la kluboj, b) organizi trejnadon de aktivuloj por provizi klubojn per instruistoj kaj c) financi la instruadon de la internacia lingvo per diversaj rimedoj, i.a. per la kanalo Jutubo.

La sekcia establo konfirmis al la ĉeestantoj sian disponeblon trejni aktivulojn kaj prdiplomi ilin, helpe de ILEI kaj aliaj eventualaj partneroj.

Notindas, ke la renkontiĝo dekomence estis planita por okazi en la Nacia Pedagogia Universitato (UPN), sed pro striko tie, ĝi devis translokiĝi. Konsekvence, nur malmultaj esperantistoj povis partopreni. La posta konversacia rondo okazos venontdecembre en ligo kun la Zamenhofa Tago (ankaŭ konata sub la Tago de la Libro) en UPN, kie Esperanto-semoj jam ekzistas kaj atendas nur akvon por kreski.

**Florent Ntoto**

La libroservo disponas malpli da tempo kaj restas tre malmulte da mono. Tamen eblas sendi librojn kaj materialojn al Afriko.

Por faciligi la sendon, la petanto devas sciigi la ĝustan adreson per kiu la pakaĵo alvenos al li. Li devas ankaŭ sciigi klaran liston pri titolo, prezo de ĉiu libro, materialo laŭ informoj ĉe: *https://katalogo.uea.org/.* La koncerna persono devas certiĝi, ke ne estas problemoj pri dogano, livero k.s.

Bv. sendi vian peton al: *hounfranc1@yahoo.com*

**François Hounsounou**

# ILEI gratulas DR Kongon

Mi tre gratulas niajn gekolegojn en Kinŝaso, DR Kongo, pro la okazigo de tiu kunveno, kiu rilatis al fortigo de lokaj kluboj. Tiaj diskutoj povas helpi.

Same valorus diskuti pri eksteraj rilatoj, kiel alparoli urbestron aŭ ĵurnaliston.

Same valorus kunveno por lertiĝi en la uzo de la lingvo, ekzemple uzante la proponitan tekston por la Komuna Legado, okaze de la Tago de la Libro.

En 2019 tiu teksto estas *Super* de Hector Hodler *https://eventaservo.org/eventoj/ef228b.*

Pri Hector Hodler vi povas pli scii, legante en *https://eo.wikipedia.org/wiki/Hector_Hodler*

Elkore kaj subteneme.

**Mireille Grosjean,**
**Prezidanto de ILEI**

# Pretas la voĉlegita oktobra numero de *Esperanto*




La tekstoj estas legitaj de volontuloj de pluraj landoj por vidhandikapitoj kaj eventuale estas uzeblaj ankaŭ por plibonigi aŭskultan komprenon de Esperanto. Ĝuu *https://uea.org/revuoj/sono*

Ni nun petas, ke vi plusendu la suban tekston al diskutlistoj kaj grupoj de via lando por instigi la homojn aŭskulti la revuon. *https://uea.org/revuoj/sono*

Ni volus scii ankaŭ, ĉu vi konas iun blindan esperantiston, kiu ankoraŭ ne ricevas la voĉlegaĵon kaj ŝatus ĝin ricevi, aŭ se vi havas iun grupon de lernantoj aŭ homoj, kiuj emus ĝin aŭdi por plibonigi sian aŭskultan komprenon de la lingvo; tiukaze vi rajtas elŝuti la tutan numeron laŭ malpeza formo, nur alklaku ĉi tien por ĝin elŝŭti: *https://wetransfer.com/downloads/fefb070851efec53046ae816eddeb41620191011043659/da09b4*

**Luis Obando**

# Poemo: *Al mia patrino* de Camara Laye

*Nigra virino, afrika virino,*
*Ho mia patrino, mi pensas pri vi...*
*Ho Daman, ho mia patrino,*
*Vi, kiu portis min sur la dorso,*
*Vi, kiu mamnutris min, vi, kiu regis miajn unuajn paŝojn,*
*Vi, kiu unue malfermis miajn okulojn pri la mirindaĵoj de la tero,*
*Mi pensas pri vi...*

*Ho Daman, ho mia patrino,*
*Vi, kiu viŝis miajn larmojn,*
*Vi, kiu ĝojigis mian koron,*
*Vi, kiu pacience eltenis miajn kapricojn,*
*Kiel mi ankoraŭ volus esti proksime de vi,*
*Esti infano proksime de vi!*



*Simpla virino, virino de rezigno,*
*Ho mia patrino, mi pensas pri vi.*
*Ho Daman, Daman de la granda familio de forĝistoj,*
*Mia penso ĉiam turniĝas al vi,*
*La via je ĉiu paŝo akompanas min,*
*Ho Daman, mia patrino,*
*Kiel mi ankoraŭ volus esti en via varmo,*
*Esti infano proksime de vi...*

*Nigra virino, afrika virino,*
*Ho mia patrino,*
*Dankon, dankon pro ĉio, kion vi faris por mi,*
*Via filo tiom malproksime, tiel proksime de vi.*

*Virino de la kampoj, virino de la riveroj,*
*virino de la granda rivero, ho vi, mia patrino, mi pensas pri vi…*

***<u>Elfrancigis</u>: Adjévi Adjé***

# Forpasis Ambrosse Fraten Polle

Ambrosse F. Polle naskiĝis la 20-an de februaro 1970 en Malya Kwimba, distrikto Mwanza, Tanzanio, kaj mortis la 2-an de aŭgusto 2019.

Li kreskis en la mano de sia avino, post la morto de sia patro en 1972, kaj finsukcesis en mezgradaj studadoj pri ekonomio en la jaro 1992. Li poste laboris en entrepreno de ĉarpentistoj.

En la jaro 1994 Ambrosse F. Polle komencis lerni Esperanton. Dum la lernado li tuj montriĝis kapabla kaj baldaŭ lerta progresinto per la flua parolado de la lingvo. En la jaro 2002 li diplomiĝis kaj ricevis atestilon de ILEI kiel instruisto de Esperanto. Li gvidis plurajn E-kursojn en Tanzanio. Lastatempe li instruis la lingvon ankaŭ ŭatsape al personoj de pluraj afrikaj landoj. Li entute valore helpis en la instruado kaj disvastigo de Esperanto en Afriko.

En 2005 li gvidis ĉeestan kurson en Bunda, kie la loka polico, misinformita, bedaŭrinde



Kelkaj lokaj e-istoj kun la famillio de Polle



arestis lin kun 4 kursanoj. Polle kaj 2 aliaj, nome Mutetulwa Mahungu kaj Manywa Pepo, ambaŭ rifuĝintoj el DR Kongo, estis akuzitaj en tribunalo kaj enkancerigitaj por ses plenaj semajnoj.

En la jaro 2006 Polle edziĝis kun Pendo Mayala. Ili havis familion kun tri infanoj el kiuj 2 filinoj: Anna Maria Polle (12-jara), Eliza Polle (5-jara) kaj 1 filo: Hans Mayila Polle (10-jara).

Subite en la jaro 2014 Ambrosse perdis sian marŝkapablon, pro malsaniĝo. Li devis ekde tiam uzi lambastonojn kaj poste rulseĝon por moviĝi, ĝis li forpasis en la malsanulejo de sia hejmurbo, pro rena insuficienco kaj postaj komplikaĵoj.

Lia entombigo okazis la 5-an de aŭgusto 2019 en Mwanza ĉeeste de la familianoj kaj kelkaj lokaj esperantistoj, kiel montras la fotoj.

*pauljoseph115@gmail.com*
**Paul Kusaya Katuju**

***Esperanto en Afriko*** estas trimonata oficiala periodaĵo de la Afrika Komisiono de UEA pri la Esperanto-movado en Afriko.

**Redaktis:** Adjévi Adjé,
06 B.P. 61807, Lomé, Togolando;
tel.: +228 902 57 549, 995 72 623.

Kion faras via landa asocio aŭ via loka E-klubo en via loĝloko? Bonvolu verki kaj sendi artikolon pri tio. La redakcio akceptas ankaŭ fotojn. Bonvenaj kompreneble estas ankaŭ sugestoj, konsiloj, komentoj por la plibonigo de la bulteno al: *adjevia@gmail.com*.

**Limdato por la 40-a n-ro:** la 30-a de decembro 2019.

**Membroj de la Afrika Komisiono de UEA (2019-2022):**

**Kunordiganto:** S-ro François Hounsounou, **Benino**
**Vickunordiganto:** S-ro Gilbert Niyukuri, **Burundo**
S-ro Joel Muhire Ndaziboneye, **DR Kongo**
S-ino Miora Raveloharison, **Madagaskaro**
S-ro Moses Gbetogo Opa, **Niĝerio**
S-ro Viktor Ntonto, **Kameruno**
S-ro Adjévi Adjé, **Togolando**
S-ro Cedrick Irakoze, **Kenjo**

Pli da informoj rilate al la afrika movado haveblas per: ***www.esperanto-afriko.org.***